



PENSEO

N-ro 257

mar. / 2013

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Dimitrije Janicic (Serbujo)



TEMPO

Ni, homoj en tempo, sur Tero,
eble ies ĵetita semo en spaco,
vagaduloj sur planedo-bariero,
ni daŭras dank' al ĝia donaco.

Ne trovante bonajn respondojn,
homo malcerta, nekompleta,
funebradas ekzistantajn mondojn
pro ilia provizoreco hermeta.

Diritas ke tempon oni devas gardi.
Diru al mi, kie ĝin ni povus aĉeti?
Permesu al mi tra tempo boardi
kaj, kial ne, per piedo ĝin treti.

Oni diras ke tempo estas mono.
Ĉu vi povas vian tempon vendi?
Ĉu sekundon, horon kaj eonon
iam, ie, eble, oni povus mendi?

Oni diras – ĝi estas senpreza
historia, senfina, perdita,
nova, fora, senlima, peza,
universala, reala, eble ŝtelita...

Diablo portu, ĝi multajn nomojn havas,
eĉ ĵunan, malnovan, oran, laboran, donitan,
ni provas mezuri ĝin, sed ni nur lavas
en ĝia daŭro al ni kurta, neniam difinita.

Nia tempo por nasko, kresko, matura,
amo, serĉado, maljuneco, iro, reiro,

tempo de rido, ploro, forgeso, memoro,
ripozado, atendo, laboro, puno, admiro.

Ĉu nia daŭro estas ĝia mezuro?
Ĝi restas – senfino, kaj ni – provizoro,
nur rudimentoj de ĝia arkitekturo,
ĝenerale ĉion kaŝos tempa pulvoro.



* *La poemo aperis en aŭtora kolekto MATURAJ
MEDITADOJ kaj samtempe en LITERATURA FOIRO
n-ro 259, oktobro 2012)*

Paŭlo Silas (Brazilo)



ATENTU, PERFIDULOJ!

Komputilaj musoj fosis sian estontecon:
Tuŝekranoj anstataŭos nian taŭgan eston.
Modernuloj nin perfidas, ĵetas nin rubujen.
Ili penas pri progreso, tamen iri kien?

Ni avertas, ke vi pentos pri la perfideco.
Bone notu, ke konsilo estas ĉi sugesto.
Ĉu kialo? O keĵ, ni prezentos al vi du jen:
Kiu tajpmontrilon ĉiam lerte gvidis ĉien?

Kiu klakis sur la virtualaj prembutonoj?
Ĉu forgesi niajn ĉarmajn simplajn
klik-klak-sonojn?!

Ho, jes! Vi ja pentos pri ĉi tiu perfideco,

Ĉar vi amas monon, vi vin vendis en komerco.
Viaj manonervoj devos pagi altan prezon.
En muzeon ne enmetu nin! For la komplezo!



Anteo (Ĉinujo)



Kie mi estas?

kie mi estas?
en la aliaj ses dimensioj.
momenton! respondas la ombro.
la spuroj riveliĝos baldaŭ el la forviŝitaj.

Forgeso kaj memoro

iam sablero min plorigis;
kie kaj kia nun ĝi estas,
mi neniam volas scii.
iam vento rabis al mi ĉapon;
kiam kaj kiel tio okazis,
mi jam forgesis.
iam mi ŝtelis de ŝi la folion;
kiam kaj kiel tio okazis,
ŝi jam ne memoris?
iam mi ŝin plorigis;
kie kaj kia nun mi estas,
ŝi ĉiam volas scii?

Somero inter muroj

foriginte la tegmenton per spirblovo,
mi ĝuas pluvan duŝon en la lito.
kiam tondro faliganta la murojn alvenos,
por ke la gejsero verdigu montparon?



Cezar (Germanujo)



Ĉu tempo ekzistas?

Ni mortas,
sed la materio de ni ne mortas,
ĝi nur ŝanĝiĝas.
Tempo do ne vere ekzistas,
tiel kiel ne ekzistas trianguloj,
kvaranguloj aŭ nombroj
en la reala mondo.
Estas nur absolutaj ideoj!
Sed ni bezonas la ideon tempo
kiel ŝildojn en arbaro,
kiel matematikajn formulojn
sen reala bazo,
por pli bone povi orientiĝi
en la nuno.
Sed kio estas nia spirito?
Jen komplika enigma afero,
estas funkcio de nia cerbo,
sed certe ne nur...
Mi persone pensas,
ke nia spirito estas parto de ia universala
spirito,
de iuspeca universala penskapabla materio,
kiu ne estas DIO!
Spirito estas en ĉiu atomo,
ankaŭ en ŝtonoj,
tiel kiel genoj en korpo
aŭ kiel elementoj
en la perioda sistemo
de Mendelejev.
Certe ankaŭ nia spirito estas evoluprodukto,
sendube ni pensas surbaze de antaŭaj pensoj,
sed strange estas, ke ni povas pensi
kvazaŭ ni estus ekstere de ni mem,
ni rigardas nin mem, kvazaŭ de ekstere,
kvazaŭ ni estus ne ni mem.
Eĉ en akcidentoj
ni kapablas al tio,
jam korpe detruita
ni ankoraŭ flugas pense,

spirite povas forlasi nian korpon.
 Tial ni ankaŭ povas senti nin junaj,
 dum nia korpo disfalas jam.
 La fizikistoj bezonas kvin dimensiojn
 aŭ eĉ pli da ili por doni
 bizarajn klarigojn pri la mondo,
 sed eble ĉio estas multe pli simpla,
 eble tempo vere ne estas materia,
 sed ĉio estas nur nuna...
 Ankaŭ la historio en tiu senco ne ekzistus,
 sed estus parto de nia nuno;
 tiu penso jam delonge estas en mi.

Mi ekzemple simple ne akceptas,
 ke miaj poemoj estas pasinta historio,
 ili estas por mi parto de mia nuno.
 Kaj tiel mi traktas ilin,
 kun pli da zorgemo,
 mi ne forĵetas ilin post verkado,
 sed vivas kun ili.
 Foje mi eĉ "parolas" kun ili
 kaj akceptas okulume ŝanĝdezirojn.

Ili neniam pretas, ĉar mi ne pretas.
 Se mi pretus, mi estus morta,
 do disbatita atomaro.

Leieladonna (Meksikio)



LEIELADONNA



En mildaj sonĝoj
 la rev' de Leieladonna
 plenas de floroj.

Pace sen bruoj
 birdoj kaj papilioj

nur melodias.

Dum korpo dormas
 eterne sen vekigî
 anim' liberas.

Jadranka Miric (Serbujo)



Noktokunveno

Sur fenestro mi kubutapogiĝanta ,
 ĉielon senfinan mire observanta.
 Subite aperis Luno arĝenbrila.
 Sur tablo kaĝo. En ĝi birdo trila...
 "Luno, luneto brila vojaĝanto,
 kie nestas karulo, mia amanto?"
 Plendas trista birdo mia,
 pro longdaŭra angoro sia.
 "Ne venas sur riveret`mia karulin',
 nek en akvomuelejon por kaŝi sin".
 Tiam vento mildblove respondis,
 "Via kara ĉi-nokte, ĝoja al vi venos,
 atendu vi, ŝi gajecon al vi prenos."

PETRO PALIVODA (Ukrainio)

Identulo

Vi estas al mi tiel korinklina,
 vi kuras al mi renkonten,
 vi kaptas mian rigardon
 kaj serĉas mian subtenon.
 Kial vi estas ĉiam sopira,
 mia spegula identulo?
 Ĉu vi ne ekvidis,
 ke mi jam ridetas?

Kalendaro

fenestron mian
 enflugis folieto flava
 de poplo smelta
 apud dom' kreskanta
 mi miris ĉar somero
 plu estas kalendare
 probable folietoj

ne konas kalendaron

Feliĉa homo

mi vidis feliĉan homon
li sidis sur benko en parko
kaj ial ridetis
ĉirkaŭ li flugis birdetoj
kaj multaj sentime sidiĝis
sur liajn manplatojn kaj ŝultrojn
kaj poste la homo foriris
mi okupis la saman benkon
kaj ankaŭ komencis rideti
sed birdoj al mi
ial ne flugis

Siv Burell (Svedio)



Vera demokrati-fantazi

Sportpsikologo,
diris al la konkursantoj:
”Pensu positive ĉiam
ne estu kriemulantoj
sed imagu unu venkon iam.

Sur premian tribunon ili staras
tre riĉaj sentas sin
Sed diru min, ĉu ne avaras
la aliaj, kiuj ankaŭ streĉis sin?

Pli vastan tribunon oni devas fari
por ke ĈIUJ povas tie stari!

Théodore Macaigne (Francio)



Ĝi restas senviva

Ni marŝas sur ĝi
Ĝi nenion diras
Ni kraĉas sur ĝi
Ĝi ne movas
Ĝi restas senviva

Al ĝi, ni povas ĉion fari
Ĝi povas ĉion sperti
Sur ĝi, monstra pezo
La vento, la neĝo, la pluvo
Ĝi restas senviva

Kaj ni povas detruĝi ĝin
Por konstrui ion
Aŭ simple por detruĝi ĝin
Ĝi diras ĉiam nenion
Ĝi restas senviva

Mi ne parolas de la grundo
El pavimero, el betono
Sed de la homaro.
Ĝi spertas la terurecon
Ĝi restas senviva



Mehmet BISLIMI (1958-)



Tempo ekstertempa

Dum vintra tempo
Neĝo ne falanta
Anakronika banalaĵo

Dum somera tempo
Pluvo forgesas sian teron
Moderna puno

Tuta ĉiu tiu scienca evoluo
La ĉielon traesploras malkovrante novajn
galaktikojn
Espero de la homaro por trovi la promesitan
saviĝon
Post kvincent milionoj da jaroj
Ni nutriĝas per la sciencaj sukcesoj
Fantasta mondo
Kiu la hodiaŭon mortigas per veneno kaj
pulvo

Per la atoma pezo
Per la sanga koloro
Per la larma salo

Skeletoj disĵetitaj kien ajn
Surtere restinte
Tiu ĉi mondo moderna
La Futuron promesas
Degelita promeso
Por translokigi la atenton ekster nian
galaktikon
Tie kie ni povas atingi
Kvincent milinojn da jaroj pli poste
Tie kie la homaro la saviĝon trovas
La kapon apogos sur la polusa stelo
La dormon konforte faros
Kaj plezuron ĝuos

La neĝo kiu ankoraŭ ne glaciigis
La seka vetero kiu pluvon ne alportas
La floro kun lipoj inflamitaj
Anstataŭ la aromo
Fumon eligas

Mi aŭguras ke finfine aperu Dio
Diris min iu amiko
Por ke atestu sian ekziston
Por la fakto kial do li permesas
Ke la ignoreco estiĝu kiel saĝecon
La avideco kiel virton
La rabado kiel kapablecon
La ŝtelado kiel bravecon
La anarĥio kiel ordon
La malmoraleco kiel normon
La perfideco kiel lertecon
La hipokriteco kiel sincerecon
Inter la supozo pri ties ekzisto
Mi estu erara
Amen

Januaro, 2013

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Pablo Neruda (1904-1073)



Odo al pano

El la maro kaj el la tero ni faros la panon,
ni kultivos je greno la teron kaj la planedojn,
la pano de ĉiu buŝo,
de ĉiu homo,
ĉiutage
alvenos ĉar ni iris ĝin semi
kaj produkti ne por unu homo
sed por ĉiuj,
la pano, la pano
por ĉiuj popoloj
kaj kun ĝi tio, kio havas
formon kaj saponon de pano
ni dividos:
la teron,
la belecon,
la amon,
ĉio ĉi havas saponon de pano.

Esperantigis



Helena Tylišpka (Italujo)

**La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas
staĝo PRINTEMPaS** kun intensivaj kursoj,
internaciaj KER-ekzamenoj, seminario pri
inturkultura komunikado 20a de aprilo ĝis 1a de
majo 2013 => gresillon.org/printempo

laŭtema SOMERA programo:

Turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj +
Art-amatora semajno + Alternativa MOJOSejo
Festa semajno por infanoj kaj familioj + Teatra
aktora Semajno 6a de julio ĝis 17a de aŭgusto 2013

=> gresillon.org/somero

kontakto: MCE Grésillon, 49150 St. Martin d'Arcé,
France, +33-2.41.89.10.34,

kastelo@gresillon.org, www.gresillon.org

Alain Souchon (1944-)



Surtersidi

Vi certe vidos, ke iam laciĝa
Sidiĝos mi sur l'apudan trotuar-o-on
Vi ja vidos : tie estos ne nur mi
Sidantaj sur pavim'.

Nur « ĵinon » uzi kaj filmon rigardi :
Jen dudek-ok jam aĝas oni ;
Kaj en la kor' nenion plu por senti.
Do kial ne kaŭri ?

Vi certe vidos, ke iam laciĝa
Sidiĝos mi sur l'apudan trotuar-o-on
Vi ja vidos : tie estos ne nur mi
Sidantaj sur pavim'.

De longe deforstiritaj estas ni,
Ke nek paroloj nek muzik' 'stas far ni ;
Sur stilzoj artaj sentiĝas l'kap' turni.
Do kial ne kaŭriĝi ?

Vi certe vidos, ke iam laciĝa
Sidiĝos mi sur l'apudan trotuar-o-on
Vi ja vidos: tie estos ne nur mi
Sidantaj sur pavim'.

Pafklikon iĝas plirapidigilo,
Malamikoj 'stas en retrospegulo,
Je cent ok-dek ne plu estas memoro.
Do kial ne kaŭri ?

Vi certe vidos, ke iam laciĝa
Sidiĝos mi sur l'apudan trotuar-o-on
Vi ja vidos: tie estos ne nur mi
Sidantaj sur pavim'.

Mi stardormas nokte en la metroo,
En mia telefon' aŭdiĝas maro
En nigra televid' ne estas suno.

Do kiel ne kaŭro ?

Vi certe vidos, ke iam laciĝa
Sidiĝos mi sur l'apudan trotuar-o-on
Vi ja vidos: tie estos ne nur mi
Sidantaj sur pavim'.

Esperantigis



Roland Platteau (Francujo)

Nazim Hikmet (1902—1963)



*La plej stranga kreaĵo
sur la tero*

Vi similas al skorpio, mia frato
vi vivas en malkuraĝa mallumo
samkiel skorpio.

Vi smilas al pasero, mia frato
ĉiam vivanta en la pasereca tremo
Vi similas al pekteno, mia frato
ĉiam fermita samkiel pekteno, kontenta
kaj vi estas timiga , mi frato,
samkiel antikva vulkano.

Nek unu,
nek kvin,
malfeliĉe, Vi nombras milionojn
vi estas kiel ŝafo, mia frato
kiam la ĉifonfiguro levas sian bastonon
vi rapide aliĝas al la grego
kaj kuras, preskaŭ fiere, al la buĉejo.
Vi estas la plej stanga kreaĵo sur la tero-
eĉ pli stranga ol fiŝo
kiu ne povis vidi la oceanon pro akvo.
kaj la subpremo en la mondo
okazas pro vi.
kaj se ni estas lacaj, malsataj, kovritaj per
sango,
kaj ankoraŭ plu subpremataj samkiel vinberoj
por nia vino,
la kulpo estas via.

Mi apenaŭ povas deteni min diri tion,
sed granda parto de la kulpo, mia kara frato,
estas via.

Esperantigis



Mori (Usono)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Novjaran saluton

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling*

Beno, beno,
bonfartu sen ĝeno,
penu kun kuraĝo
en nova vojaĝo.
Ĝoja, ĝoja
sukceso refoja.

Sano, sano,
tenu ĝin en mano.
Vivu sen ĉagreno
ĝis oldeca veno.
Nove, nove,
antaŭen tutpove.

Vero, vero,
por nia afero
strebu kun fervoro
agu en verd-gloro.
Rolo, rolo,
persistu kun volo.

**Tiaoxiaoling (Flirta kanto): ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*

Malforta homaro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

ruinon
postlasis tertrem'
homoj ja senrimedas
pentas kaj ploras kun ĝem'
vere en dilem'

kaoson
kaŭzas la cunam'
domoj falas krepite
ĉion regas malord' jam
sen ajna balzam'

inundo
voras avide
de la senhelpaj homoj
ĉion tre altrapide
vere senbride

neĝego
pezas subpreme
detruas varm-rimedojn
homoj dentgrincas treme
de frost' ekstreme

sunardo
mortigas bake
gren-plantaĵojn en kampo
homoj veas lang-klake
malplen-stomake

la homar'
kontaŭ la natur'
ja malfortas kapkline
katastrofoj de tortur'
vipas kun terur'



**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo*

xa,xa,a (x=senrima)

Sero (Ĉinujo)

Maldormado

—laŭ ĉinesko Sumuzhe*

Lunlumo
arĝente
verŝiĝas. Mi
veas lamente
turniĝadis serpente
pro ĉagreno
ĝena turmente

Paseoj
torente
svarmas mensen.
Ĉu preĝi pente
aŭ forgesi sensente?
Forlasu do
indiferente.

*Sumuze (*Virina ĉapo*): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 7 versoj de 33, 45, 7,45 silaboj, laŭ rimaranĝo *xa,xa,a,xa (x=senrima)*

Niuniu (Ĉinujo)

Revidiĝo post longa tempo

—laŭ ĉinesko Dianjiangchun*

Ĉe l' printemp-fest'
kun gefratoj kunas mi
pro nostalgii'
kaj sopir-seri'.

Granda ĝojo
muzika ari'
glas' en man'
vinluda kri'
ĝis plena ebri'.

*Dianjiangchun (*Ruĝiĝitaj lipoj*): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo *xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)*

Maupassant (1850-1893)



MIA ONKLO JULIO

Al S-ro Achille Benouville

Maljuna malriĉulo, kun blanka barbo, almozpetis al ni. Mia kamarado Jozefo Davranŝo donis al li cent soldojn. Mi miris pro tio. Li diris al mi:

– Tiu mizerulo memorigis al mi rakonton, kiun mi tuj diros al vi, kaj kies memoro senĉese turmentas min. Jen ĝi:

Mia familio, devena el Havro, ne estis riĉa. Ni elturniĝis, jen la tuto. La patro laboris, malfrue hejmen revenis de la oficejo, kaj ne multe perlaboris. Mi havis du fratinojn.

Mia patrino tre suferis pro la ĝeno en kiu ni vivis, kaj ofte ŝi trovis akrajn parolojn por diri al sia edzo, insidemajn kaj aludajn riproĉojn. Tiam la kompatinda viro faris geston, kiu korpemis min. Li pasis sian malferman manon sur la frunton, kiel por viŝi ŝviton, kiu ne ekzistis, kaj nenion li respondis. Mi sentis lian senpotencan doloron. Ni ŝparis ĉion; neniam ni akceptis inviton por vespermanĝi, por ke ni ne redonu ĝin; ni rabate aĉetis la proviantojn, la butikajn nevenditaĵojn. Miaj fratinoj faris siajn robojn mem, kaj longe diskutadis pri la prezo de la galono, kiu kostis po dek kvin centimojn metre. Nia ordinara nutraĵo konsistis el grasa supo kaj bovaĵo pretigita per ĉiuj saŭcoj. Tio estas sana kaj refortigita, laŭdire; mi estus preferinta aliajn manĝaĵojn.

Oni faris al mi abomenindajn scenojn pro la perditaj butonoj kaj la disŝiritaj pantalonoj.

Sed ĉiudimanĉe, paradvestitaj, ni iris promenadeti sur la ĝeton. Mia patro, vestita per sia redingoto, sia granda ĉapelo, siaj gantoj, proponis sian brakon al mia patrino, tutflagita kiel marŝipo okaze de festotago.

Miaj fratinoj, pretaj la unuaj, atendis la startsignalon; sed, ĉe la lasta momento, ni ĉiam malkovris forgesitan makulon sur la redingoto de la familia patro, kaj rapidege necesis forigi ĝin per ĉifono malsekigita per benzeno.

Mia patro, konservante sian grandan ĉapelon surkape, atendis, lasante vidi la manikojn de sia ĉemizo, la finon de la operacio, dum mia patrino rapidegis, post alĝustiginte siajn miopokulvitrojn, kaj demetis siajn gantojn por ne difekti ilin.

Poste ni ceremonie ekvojiris. Miaj fratinoj antaŭen marŝis, brako en brako. Ili estis en edziniĝa aĝo, kaj enurbe tion oni elmontris. Mi staris maldekstre de mia patrino, dum mia patro restis dekstre. Kaj mi memoras pri la pompa mieno de miaj malriĉaj gepatroj dum tiuj dimanĉaj promenadoj, pri la rigideco de iliaj trajtoj, la severeco de ilia aspekto. Ili gravpaŝe antaŭeniris, kun la korpo rekta, la kruroj rigidaj, kiel se afero de ekstrema graveco dependis de ilia sinteno.

Kaj ĉiun dimanĉon, vidante eniri en la havenon la grandajn marŝipojn, kiuj revenis de malproksimaj kaj nekonataj landoj, mia patro nevarie prononcis la samajn parolojn:

– Nu! se Julio estus ene, kia surprizo! Mia onklo Julio, la frato de mia patro, estis la nura espero de la familio, post estinte la teruro. De mia infaneco, mi aŭdis paroli pri li, kaj ŝajnus al mi, ke mi rekonus lin je la unua ekrigardo, tiom lia pensado fariĝis al mi familiara. Mi sciis ĉiujn detalojn pri lia ekzistado, ĝis kiam li foriris al Ameriko, kvankam oni parolis nur mallaŭte pri tiu periodo de lia vivo.

Laŭdire, li havis malbonan konduton; tio estas, ke li malŝparis la monon, tio kio ja estas la plej granda el la krimoj por la malriĉaj familioj. Ĉe la riĉuloj, viro kiu vivas senbride *faris stultaĵojn*. Li estas tio, kio ni ridetante nomiĝas festemulo. Ĉe la necesbezonuloj, knabo kiu devigas la gepatrojn ekelspezi la kapitaleton fariĝas malbonulo, diboĉulo, fiulo!

Kaj tiu distingeco estas justa, kvankam la okazaĵo estas same, ĉar nur la konsekvencoj determinas la gravecon de la ago.

Fine la onklo Julio multe malgrandigis la heredon, pri kiu mia patro kalkulis, post cetere, li mem malŝparegis sian parton ĝis la lasta soldo.

Oni enŝipigis lin al Ameriko, kiel oni faris en tiu epoko, sur komercan marŝipon, kiu iris de Havro al Nov-Jorko.

Tuj kiam li estis tie for, mia onklo Julio instaligis kiel vendisto pri kio mi ne scias, kaj li skribis, ke li perlaboris iom da mono, kaj li esperis povi kompensi mian patron pri la damaĝo, kiun li faris al li. Tiu letero kaŭzis egan emocion en la familio. Julio, tiu ega sentaŭgulo, kiu ne valoras, kiel oni diras en Normandio, la *kvar hufoferojn de hundo*, subite fariĝis honesta viro, bonkora knabo, vera Davranŝo, nekoruptebla kiel ĉiu Davranŝo.

Krome ŝipestro sciigis al ni, ke li luis grandan butikon, kaj li multe komercis.

Dua letero, du jarojn pli poste, diris: "Mia kara Filipino, mi skribas al vi, por ke vi ne maltranviliĝu pri mia sano, kiu estas bona. La aferoj ankaŭ iras glate. Morgaŭ mi ekforiros por longa vojaĝo al Suda Ameriko. Eble mi ne donos novaĵojn al vi dum pluraj jaroj. Se mi ne skribos al vi, ne estu maltrankvila. Mi revenos al Havro, kiam mi riĉiĝis. Mi esperas, ke tio ne daŭros tro longe, kaj ni vivos feliĉaj kune..."

Tiu letero fariĝis la evangelio de la familio. Ni legis ĝin ĉiumomente, ni montris ĝin al ĉiuj.

Efektive dum dek jaroj, la onklo Julio ne plu donis novaĵojn; sed la espero de mia patro pliampleksiĝis laŭmezure kiam la tempo pasis; kaj mia patrino ofte diris:

– Kiam tiu bona Julio estos tie, nia situacio ŝanĝos. Jen iu, kiu sciis elturniĝi sendamaĝe!

Kaj ĉiudimanĉe, rigardante veni el la horizonto la dikajn nigrajn vaporŝipojn, kiuj vomis al la ĉielo serpentojn de fumo, mia patro rediris sian eternan frazon:

– Nu! se Julio estus ene, kia surprizo!

Kaj ni preskaŭ atendis vidi lin svingi poŝtukon, kaj krii:

– Hoj! Filipo.

Ni ŝpinis mil projektojn pri tiu certa reveno; ni devus eĉ aĉeti, per la mono de la onklo, malgrandan kampan domon proksime de Ingouville. Mi ne asertus, ke mia Patro ne jam ekkomencis traktadojn pri tio.

Tiam la unuenaskito de miaj fratinoj aĝis dudek ok jarojn; la alia dudek ses. Ili ne edziniĝis, kaj tio estis ega aflikto por la familiano.

Fine svatiĝanto sin prezentis por la dua. Oficisto, ne riĉa, sed honorinda. Mi ĉiam estis konvinkita, ke la letero de la onklo Julio, montrita dum vespero, ĉesigis la hezitojn kaj provokis la decidon de la fraŭlo.

Oni akceptis lin kun diligenteo, kaj oni decidis, ke post la geedziĝo la tuta familio kunvojaĝetos al Ĵerzejo.

Ĵerzejo estas la ideala vojaĝo por la malriĉuloj. Tio ne estas malproksime; oni transpasas la maron per pasaĝerŝipo, kaj oni sin trovas en eksterlandan teron, tiu insuleto apartenante al la Angloj. Do, Franco, post du horoj de marnavigado, povas oferti al si la vidon de najbara popolamaso, kaj esplori la morojn, cetere bedaŭrindajn, de tiu insulo kapvestita de la brita standardo, kiel diras la geuloj, kiuj simple parolas.

Tiu vojaĝo al Ĵerzejo fariĝis nia absorba zorgo, nia ununura atento, nia konstanta revo.

Fine oni foriris. Mi vidas la scenon, kiel se ĝi okazus hieraŭ: la vaporŝipo kontraŭ la kajo de Granville; mia patro, konsternega, kiu atentis la enŝipigon de niaj tri pakaĵoj; mia patrino, maltrankvila, kiu tenis la brakon de mia needziniĝinta fratino, kiu ŝajnis perdita de post la foriro de sia fratino, kiel kokido kiu

restas sola de sia kovitaro; kaj, malantaŭ ni, la novaj geedzoj, kiuj ĉiam restadis malantaŭe, tio kio ofte turnigis al mi la kapon.

La ŝipo fajfis. Ni estis enŝipiĝintaj, kaj la marŝipo, forlasante la ĝeton, malproksimiĝis sur maro, plata kiel tablo el verda marmoro. Ni rigardis fuĝi la marbordon, feliĉaj kaj fieraj, kiel ĉiuj tiuj, kiuj malmulte vojaĝas.

Mia patro streĉis sian ventron, sub sia redingoto, al kiu la matenon mem, oni zorge forviŝis ĉiujn makulojn, kaj li dislasis ĉirkaŭ li tiun odoron de benzeno de la liberripoztagojn, kiu rekonigis al mi la dimanĉojn.

Subite, li ekvidis du elegantajn sinjorinojn, al kiuj du sinjoroj proponis ostrojn. Maljuna vestaĉita matroso malfermis la konkojn per tranĉilbato, kaj transdonis ilin al la sinjoroj, kiuj poste prezentis ilin al la sinjorinoj. Tiuj ĉi manĝis per delikata maniero, tenante la malfermitan ostron sur fajna poŝtuko, kaj antaŭenirante la buŝon por ne makuli siajn robojn. Poste ili trinkis la akvon per rapida malgranda movo, kaj ĵetis la konkon en la maron.

Mia patro, sendube, estis ĉarmita de tiu distinga maniero manĝi ostrojn sur ekiranta marŝipo. Li trovis tion bonaspekta, rafinata, supera, kaj li alproksimiĝis al mia patrino kaj miaj fratinoj, demandante:

– Ĉu vi volas, ke mi donacu al vi kelkajn ostrojn?

Mia patrino hezitis, pro la elspezo; sed miaj du fratinoj tuj akceptis. Mia patrino diris, per ĉagrenita voĉsonado:

– Mi timas dolori al mi la stomakon. Donacu tion al la infanoj, sed ne tro multe, vi malsanigos ilin.

Poste, sin turnante al mi, ŝi aldiris:

– Pri Jozefo, li ne bezonas tion; nepras, ke ni ne trodorlotu la knabojn.

Do mi restis apud mia patrino, trovante maljusta tiun apartaĵon. Mi sekvis per la okuloj mian patron, kiu bombaste kondukis

siajn du filinojn kaj sian bofilon al la maljuna vestaĉita matroso.

La du sinjorinoj ĵus foriris, kaj mia patro indikis al miaj fratinoj, kiel ili devis fari por manĝi ne lasante versiĝi la akvo; li eĉ volis ekzempli, kaj li ekprenis ostron. Provante imiti la sinjorinojn, li tuj renversis la tutan likvaĵon sur sian redingoton, kaj mi aŭdis mian patrinon murmuri:

– Li pli bone farus teni sin trankvile.

Sed subite mia patro aperis al mi maltrankvila; li malproksimiĝis je kelkaj paŝoj, fikse rigardis sian familion kunpremaman ĉirkaŭ la ostromalfermisto, kaj bruske li venis al ni. Li ŝajnis al mi tre pala, kun strangaj okuloj. Li duonvoĉe diris al mia patrino:

– Tio estas eksterordinara, kiel tiu viro, kiu malfermas la ostrojn similas al Julio.

Mia patrino, konfuzata, demandis:

– Kiu Julio?...

Mia patro reparolis:

– Sed... mia frato... Se mi ne scius lin en bona pozicio en Ameriko, mi kredus, ke temas pri li.

Mia patrino, konsternata, balbutis:

– Vi estas freneza! Pro tio ke vi ja scias, ke ne estas li, kial vi diras tiajn stultaĵojn?

– Iru do vidi lin, Cecilia; mi preferas, ke vi faru vin certa vi mem, per viaj propraj okuloj.

Ŝi stariĝis, kaj iris rekuniĝi kun siaj filinoj. Ankaŭ mi rigardis la viron. Li estis maljuna, malpura, tute sulkiĝinta, kaj ne deturnis la rigardon de sia takso.

Mia patrino revenis. Mi ekvidis, ke ŝi tremis. Ŝi tre rapide prononcis:

– Mi ja kredas, ke estas li. Iru do demandi informojn al la ŝipestro. Sed ĉefe estu singardema, por ke nun ni ne devu ekzorgi pri tiu viraĉo!

Mia patro malproksimiĝis, sed mi sekvis lin. Mi sentis min strange emociata.

La ŝipestro, granda viro, maldika, kun longaj vangharoj, promenis sur la ponto kun

grava mieno, kiel se li komandus longdistancon ŝipon al Hindio.

Mia patro alpaŝis lin kun ceremonio, pridemandante lin pri lia metio, ne ŝparante la komplimentojn:

Kia estas la graveco de Ĵerzejo? Siaj produktaĵoj? Sia landanaro? Siaj moroj? Siaj kutimoj? La naturo de la grundoj? ktp., ktp.

Oni kredus, ke temas pri almenaŭ Usono.

Poste ili parolis pri la ŝipo, kiu kunportis nin, la *Expreso*, kaj poste ili parolis pri la ŝipanaro. Mia patro, fine, kun malserenigata voĉo diris:

– Vi havas tie maljunan ostromalfermiston, kiu aperis ja interesa. Ĉu vi scias kelkajn detalojn pri tiu ulo?

La ŝipestro, kiu ekincitiĝis pro tiu konversacio, seke respondis:

– Li estas maljuna franca vagabondo, kiun mi trovis en Ameriko dum la lasta jaro, kaj kiun mi repatriigis. Li havas, ŝajnas, parencojn en Havro, sed li ne volas reveni apud ili, ĉar li ŝuldas monon al ili. Li nomiĝas Julio... Julio Darmanĉo aŭ Darvanĉo, fine io kiel tio. Laŭdire, tie for dum momento, li estis riĉa, sed vi vidas tion, kion li fariĝis nun.

Mia patro, kiu fariĝis livida, artikulaciis, kun la gorĝo premita kaj la okuloj senrigardaj:

– Ha! ha! tre bone... bonege... Tio ne mirigas min... Mi multe dankas vin, kapitano.

Kaj li foriris, dum la maristo rigardis lin malproksimiĝi kun stuporo.

Li revenis apud mia patrino, tiom konsternata, ke ŝi diris al li:

– Sidiĝu; oni tuj ekrimarkos pri io.

Li falis sur la benkon balbutiante:

– Estas li, ja estas li!

Poste li demandis:

– Kion ni tuj faros?

Ŝi vigle respondis:

– Necesas forigi la infanojn. Pro tio, ke Jozefo scias la tuton, li tuj iros serĉi ilin. Ĉefe necesas priatenti, ke nia bofilo dubu pri nenio.

